## Deziras korespondi

Principe individuaj korespond-anoncetoj kun ĝenerala enhavo estu adresataj al k-do H. Schrimpf, Oberschlesische Str. 15/0, *München 61* (SAT-Koresponda Servo), kun 2 resp. kuponoj. Simplaj anoncetoj en S-ulo kostas 80 cendojn (2 resp. kup.). Aldonoj pri preferoj duobligas la koston. Pago per kuponoj (sed *ne* per stampitaj aŭ nestampitaj PM) al k-do C. v. Essen, Rotterdam, aŭ al SAT-parizo (se tio ne eblas pagu al via landa peranto.).

— *Jean Cézar, Villebarou,* Loir et Cher, Francio, dez. kor. kun f-inoj 25—32-jaraj el Svedio, Finlando, Norvegio.

— Kansai-Ligo de Esp. Grupoj serĉas por siaj geanoj korespondantojn en ĉiu aĝo, profesio, pri ĉia temo. Resp. garantiata. Nakacuhamadoori 2-20, Oojodo-ku, *Osaka,* Japanio.

— Japana geknaba liceo kor. k interŝ. infandesegnojn, lego-, bildlibrojn, bildkartojn k.a. diversaĵojn kun tuta mondo. Skribu aŭ sendu al: Esperanto-Klubo en Takatori Mezlernejo, Simotesaki 3 tyôme 1. Suma-ku, *Kobe.*

— *Atentu !*
ESPERANTO-INFORMEJO Fürth/Bayern, Erlanger Str. 31 respondas nur kontraŭ Resp. kupono, pro tro multe da korespondaĵoj alvenintaj. *Bruno Siegert* (28.469).

*Liberpensuloj germanlingvaj* postulu provnumeron senkostan de „Der Freidenker" (kun E-rubriko) de Eldonejo Hubert Freistühler, Verlag *Schwerte Ruhr,* Germ.

### Kaprioloj de la libera ekonomio

Pri la asertoj de k-do 22.311 en julia „*S-ulo*", p. 3-a, 1) ke la germana industrio sendis kandelojn al la nederl. Ruĝa Kruco por helpi la viktimojn de l' subakviĝo, 2) ke la ned. Ruĝa Kruco akceptis monon de la nederl. kandelindustrio, kondiĉe ke la merkato restu libera por tiu industrio, 3) ke la ned. Ruĝa Kruco vendis la germ. kandelojn al komercisto, gajnante tiel kelkajn milojn, la estraro de la Nederl. Ruĝa Kruco, al kiu mi tradukis tiujn dirojn, respondis jene:

„*La enhavon de via letero ni kun intereso legis. Ni tre ĝojas, ke vi atentigis nin pri la asertoj en la Esp. organo. Kiel vi verŝajne scias, ĉiuj varoj senditaj al la N.R.K. por la viktimoj de la subakviĝo, estas ekzakte administritaj, por ke ni poste al la donacintaj landoj povu komuniki, kian destinon akiris la senditaĵoj.*

„*En la ĉi kune al vi sendata raporto pri la helpo de la Nederl. Ruĝa Kruco vi povos legi sur paĝoj 55 k 56 tabelojn pri la varoj senditaj el Germanio. Vi konstatos, ke inter la varoj ne troviĝis kandeloj. Pri intenca agado niaflanke, profite al la Nederl. kandelindustrio, ni post funda esploro nenion povis konstati.*

„*Se vi, per kontakto kun la skribinto de la artikolo, ekscios pli da sciindaĵoj, kiuj ankaŭ estos interesaj por la N.R.K., ni volonte akceptos viajn komunikojn.*

„Nederlanda Ruĝa Kruco: La fako por ĝeneralaj aferoj W. C. J. v. Starrenburg."

*

Mi esploris la paĝojn 55-56 de la nomita volumo k trovis sur ili tabelojn pri la varoj senditaj el Germanio; inter ili fakte ne troviĝas kandeloj.

Kio instigis k-don 22.311 publikigi tiujn asertojn pri la Ned. Ruĝa Kruco? Ĉu li ne komprenas, ke li subfosas le emon pri helpo pere de tiu institucio? kaj tiel la viktimoj de katastrofoj duoble viktimiĝos? Ja multaj helpemuloj ne plu sendos ion, pensante ke tiu helpo ne atingos la viktimojn! K-do 22.311 devas pruvi siajn asertojn en „S-ulo" k por la estraro de la N.R.K. Al nia papero ne manku tolero por la vero.

*G. Broer (18.895)*

*Ni fojon plian bedaŭras, ke k-do faris kritikon nepravigitan, pro nesufiĉa esplorado.*

*Redakcio.*

# 28-a Kongreso de S.A.T.

## en Linz-Danubo, Aŭstrio, 6.—12 aŭgusto 1955

*Unua komuniko*

O.K.K.-adresoj: Sekretario: Max Hollinger, Linz/Donaŭ, Gruberstrato 65

Kasistino: Maria Gruber, Linz-Kleinmünchen 659, Konto: Arbeiterbank Filiale Linz 7598.

| | | |
|---|---|---|
| Kongreskotizoj: | Por S.A.T.-anoj | 2½ dol., |
| | geedzoj | 4 dol., |
| | Gejunuloj ĝis 20 j. | 1½ dol., |
| | Gastoj | 3 dol., |
| | Subtenantoj | 1 dol. minimume |

Ĝis 30.4.55 rabato da 20%

Neĉeestontoj ricevos la kongresmaterialon. Kongresmarkoj estas en preparo k tuj post apero la perantoj ricevos ioman kvanton.

Restado dum la Kongreso: La O.K.K. streĉos aranĝi la restadon kiel eble plej konvena k malmultekosta. Ni certe havos amasloĝejojn k ankaŭ garditan tendejon por tendumi kun propra aŭ tendo de O.K.K.

Programo: Antaŭvideblaj estas simile kiel dum la 27a Kongreso krom laborkunsidoj, fakk frakcikunsidoj, prelegoj, vizitoj al fabrikoj duontaga k tuttaga ekskurso tra Salzkammergut.

*Geknaba kongreso:* Ankaŭ en Linz aparta kongreseto kunigos ĉeestontajn geknabojn ĝis 15-jarajn.

Krome mi jam interrilatis kun diversaj societoj k grupoj pro antaŭ- k postkongresoj aranĝoj. Detaloj sekvos. Gek-doj, kapablaj por prelegoj en la kadro de laborista universitato k por prezentado dum art- k gaja vesperoj estas petataj jam nun interrilati kun O.K.K. Anoncoj jam nun estas akceptataj k ankaŭ uzeblaj la aliĝiloj de la 27a. Aliĝo validas nur kun samtempa pago de la kotizo; la aliĝilojn sendu al la landa peranto, en Aŭstrio rekte al O.K.K.

### En Harlemo......

La 39-an U.E.A.-kongreson en Harlemo aliĝis 2353 kongresanoj el 28 landoj; fakte ĉeestis 2.093, plej alta nombro de kongresanoj post la 15-a Kongreso en Nurembergo (1923). Ministroprezidanto Drees inaŭgure parolis flue esp-lingve; la du festparolantoj estis d-roj Privat k Lapenna. En multaj ĵurnaloj de la mondo aperis komunikoj pri la kongreso, k en Nederlando radio-elsendoj estis faritaj, k ekde 6 aŭgusto, dum unu semajno, aperis bildraporto pri kelkaj kongresaj scenoj en ĉiuj kinejoj nederlandaj.

T. Jung skribas en „Heroldo" (16.8.): „.... Pli varmaj estis kelkfoje la diskutoj en la komitatkunsidoj, kie estis solvendaj kelkaj gravaj demandoj; sed pri tio la ordinara kongresano nenion rimarkis...."


Kiu ne interesiĝus pri la novigado okazanta en Jugoslavio? Havigu al vi la bele prezentitajn, riĉe ilustritajn verkojn

**Biografio de Tito**

512 paĝoj
prezo 20 angl. ŝil., 2.85 dol.

**Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj**

310 paĝoj
770 fr. fr., 2.20 dol.
grandformataj libroj.

Aldonu 10% por la afranko.
Per aĉeto de tiuj libroj vi helpas al SAT enspezi parton el la grava sumo blokita en Jugoslavio.

*Mendu ĉe SAT.*


## Fakoj - Frakcioj

### Belami- k Abund-anoj

Dum frakcikunveno en Nancio Belami- k Abundana frakcio kunfandiĝis en unu solan, tial ke ili ambaŭ propagandas la samajn teoriojn. Tiu nova frakcio *Belami-Abundo* celas — propagandi esp-on en la movadoj pri abundo, disdona ekonomio k ekonomia egaleco; — diskonigi per esp-o ties ekonomiajn tezojn (per flugfolioj, artikoloj, verkoj); — studi ekonomiajn problemojn; — organo: Ekonomia Egaleco; — kotizo jara egalvaloras 3 respondkuponojn. La Frakcio estas pure ekonomia k senpolitikeca.

Sekretario-kasisto: *H. Cottereau* (Kotro), La Bretaudière, *Vaupillon* par *La Loupe* (E.L.), Francio.

Por internacia Asocio Belami subskribis la protokolon: *Fodoso.*

### Liberpensuloj

Pri „La Liberpensulo", kiun la Frakcio eldonis presite (unua numero!), ni ankoraŭ ne scias, ĉu ni daŭre sukcesos. Ĝi estas okpaĝa, en formato 13 x 21 cm., k entenas plurajn artikolojn, ankaŭ poemojn, legindajn k pripensindajn.*) La K-doj en Francio prenis sur sin la taskon aperigi la bultenon, sed iliaj klopodoj atentigi pri esp-o en liberpensulaj asocioj estas nesufiĉaj. En Britio estas bona tereno, ĉar artikoloj por esp-o aperas sufiĉe regule en „The Freethinker"; bedaŭrinde tiuj ne estas verkitaj de SAT-anoj, nek frakcianoj. En Germanio la k-doj bonege laboris, eldonis multobligitan bultenon k enkondukis esp.-angulon en „Der Freidenker". El Nederlando nenio nova, delonge. Vekiĝu, amikoj! *A. G.*

*) Oni mendas al *A. Gay,* rue Lambert-Dumesnil, *Herblay* (S.O.), Francio, poŝtĝiro: 10 549-49 Paris. Prezo de l' n-o 30 fr.fr. (10 ekzempleroj 250 fr. fr.) aŭ ekvivalento.

### Sennaciista frakcio.

50 gek-doj ĉeestis komence la dumkongresan frakci-kunsidon sed ĉar ni sidis en galerio, multaj kongresanoj venis por aŭskulti k partopreni niajn debatojn. Iu k-do proponis ŝanĝi la nomon de l' frakcio ĉar li opinias, ke la prefikso „sen" donas negativan sencon al ĝi. Ni neglektis tiun argumenton, ĉar ne la titolo gravas, sed la laboro kiun oni faras. Cetere ni ankaŭ devus ŝanĝi la titolon de „Senneciulo" pro la sama motivo. Mi legis paĝon el la „Manifesto" de Lanti k k-do Bartelmes donis klarigojn pri nia celo.

Sed ĉefan altirpunkton formis la ĉeesto de jugoslavaj gek-doj kiuj petis multajn informojn pri nia agado.

Dirende, ke ili ne klare komprenis nian ismon! La jugoslava popolo ĵus eliris malbonan sonĝon k komencas rekontakti kun la tuta mondo de laboristoj. La marksismo, kiu penetris ilin, ne alportis kion ili atendis. Ili mem rekonas, ke la mensa revolucio, la plej grava estas farota. Ni scias, ke marksismo neglektas personecon, por ĝi gravas nur kolektivo. SAT-anoj havas belan mision: helpi tiujn gek-dojn, kiuj deziras edukiĝi laŭ nia ismo k konatiĝi kun niaj principoj. Ĉar la koncernaj estas laboremaj k simpatiaj, ni rajtas atendi multon el ilia agado.

La frakcio daŭrigos aperigi tri bultenojn inter du kongresoj. Sed mi denove alvokas la verkemulojn: ni nepre bezonas materialon por tiu bulteno, kiu devas esti la verko mem de la Sennaciistoj.

Gek-doj, kiuj deziras informojn, sin turnu al la landaj frakciperantoj. Manuskriptojn senu al la sekretario de la S.F., Marso Dessoit, 44 rue Chaligny, Paris. 12.

*La denaska esperantisteto al la profesoro, kiu por la centa fojo asertas, ke esperanto mortis, ĉar....*

— *En Nancio, dum ludo k seriozo, miaj babiloj okazis en* unu *lingvo, en tiu, kiun mi lernis uzi ĉe la familia tablo.*

— *Kaj mi pruvas al vi.... ekkoleris la profesoro; sed li ne finis sian frazon. Apopleksio trafis lin.*



Preso: Drukkerij v.h. Dekker, Hardinxveld, Nederlando